

LA ĜIS NUN NEKONATA DIO

Artikolo publikigita en Adista (n.5/2011)
(Mt.5, 38-48)

Jesuo radikale distanciĝas el la dia Leĝo kiu, en la manoj de la religiaj aŭtoritatuloj, transformiĝis en instrumento pri povo por regi kaj submeti la popolamason. Ĝi estis ĉiam unudirekta Leĝo al kiu sin turnis la ĉefpastroj por defendi sian institucion, siajn privilegiojn kaj sian ŝanceliĝantan doktrinon, kiu nek esprimis la volon de Dio, nek revelaciis la vizaĝon de la Patro. Eĉ ne ununura fojo en la Evangelioj, la Leĝo estas alvokata de la ĉefoj por la popolo, sed ĉiam ĝi estas alvokata favore al la pastra kasto, ĉar, kiel jam evidentigis la profeto Jeremia, en la manoj de la pastroj la Leĝo fariĝis nur instrumento je povo: Kiel vi diras: Ni estas saĝuloj, kaj ni havas antaŭ ni la instruon de la Eternulo? Ĝi fariĝis ja mensogaĵo per la mensoga skribilo de la skribistoj!" (Jer. 8,8).

Jesuo, kiun la evangeliisto Sankta Mateo prezentas kiel la "Dio kun ni" (Mt. 1,23), venas proponi al la homoj novan bildon pri Dio kiu iamaniere povas esti entenata en la malnovaj bareloj de la religio kaj de la malnova interligo.

Moseo, servisto de la Sinjoro, trudis interligon inter servistoj kaj ilia Sinjoro kaj ĝi baziĝis sur la obeemo kaj sur la servo al Dio. Jesuo, la Filo de Dio proponas interligon inter filoj kaj ilia Patro, kiu celas la similecon kun lia amo. Kaj la servo ne plu sin turnos al Dio, sed el Dio ĝi sin turnos al la homoj, kaj tiuj ĉi kun li kaj kiel li orientos sian vivon favore al ĉiu homo.

Ne ĉiuj homoj povas aŭ volas observi la leĝojn. Ĉiuj povas akcepti la amon.

La kresko kaj la maturiĝo de la kredanto ne dependas de la observo kaj de la obeo, sed ili dependas de la praktikado de la amo, amo ricevita de la Patro kiu transformiĝas en amon komunikatan al la fratoj. Jen kial en sia instruado Jesuo sin distancigas de la normoj de la pasinteco eĉ se ilin oni atribuas al Dio mem aŭ al Moseo : "Vi aŭdis ke estas dirite... Sed mi diras al vi..." (Mt. 5,32.27.33.38.43). Ekzistas neniu kontinueco kun la pasinteco, sed estas radikala rompo. La nova vino de la amo bezonas novajn barelojn; provi ĝin enmeti en la malnovajn religiajn instituciojn signifas perdi vinon kaj barelojn (Mt. 9,17).

Jesuo ne petas obeon al la Patro, sed ke oni estu kiel li. Li ne petas obeon al Leĝoj, sed ke oni kresku en la amo: "Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu vian proksimulon, kaj malamu viajn malamikojn; sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo" (Mt. 5,43).

Kaj por komprenigi kion signifas simili la Patron, Jesuo ne riske entreprenas komplikajn teologiajn teoriojn aŭ filozofiajn disertaciojn, sed li uzas dirmanieron kaj bildojn kompreneblajn al ĉiuj. La Patro estas tiu kiu "levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj la maljustulojn." (Mt. 5, 45). Amo kiu estas proponata al ĉiuj, sen distingi inter merituloj kaj malmerituloj, inter sanktuloj kaj pekuloj. La Patro vidas la bezonojn de la homoj, li ne konsideras iliajn virtojn. Se ne al ĉiuj eblas obei la diajn leĝojn, esti bonaj apartenas al la kapabloj de ĉiu homo, pro tio la invito de Jesuo sin turnas al ĉiuj: " Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta" (Mt. 5,48).

Jesuo ne invitas esti sanktaj kiel Dio estas sankta, kun ĉio kio rezultas el tio pri la observado de leĝoj kaj normoj rilate la apartigon disde tio kio estas malpura kaj profana, sed ja Jesuo invitas esti perfektaj kiel estas la Patro, kaj lia perfekteco estas tiu de amo kiu

ne sin lasas kondiĉi de la sinteno de la homoj, sed, kiel la agado de la pluvo kaj de la suno, ĝi fekundigas kaj vivigas ĉiujn.

La perfekteco de la Patro, al kiu Jesuo invitas, konsistas el tio: esti inklinaj kiel li estas al amo kiu neniun ekskludas el sia agadradiuso. Tiu ĉi estas amo kiun oni ne disdonas kiel premion sed kiel donacon kiu ne estas altirata de la meritoj de la homoj sed de ties bezonoj. Amo de kiu ĉiu homo povas sin senti akceptata, kia ajn estas lia kondiĉo, ĉar por Dio, "oni ne devas nomi iun ajn homo profana aŭ malpura" (Agoj. 10,28).

Alberto Maggi